

# ESPERANTA FINNLANDO

1961

N:o 4

## INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

**JARKOLEKTO 1961 — 9 numeroj**  
Abonprezo enlanda 350 mk  
eksterlanda 450 mk  
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto  
8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj  
anoncoj): Männikkötie 5 M 67,  
MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Kaarlo Jokinen, Emil Stenholm, Simo Raumavirta.  
Redaktejo: Esperantotie 4, MATINKYLÄ (artikoloj, novaĵoj, recenzoj, interŝanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj societoj estas varme petataj konstante kontribui per novaĵoj kaj interesaj artikoloj, proponoj ktp., por ke nia gazeto estu vera komuna informilo.

## OSLON KAUPUNGINJOHTAJA PUHUI ESPERANTOKSI.

Norjan Esperantoliiton 50-vuotisjuhlassa puhui Oslon kaupunginjohtaja Brynjulf Bull, onnitellen vuosijuhlaa viettävää järjestöä. Puheensa kaupunginjohtaja Bull piti esperantoksi, julkaisemme sen käännettynä:

Kunnioitettavat naiset ja herrat!

Oslon kaupunginhallituksen nimissä on minulla ilo välittää tervehdys Norjan Esperantoliitolle, sen viisikymmenvuotisjuhlan merkeissä. Tähän tervehdykseen liitämme kunnianosoituksen ja kiitoksen niille kaikille, jotka ovat vieneet liikettä eteenpäin näinä viitenäkymmenenä vuotena — usein vaikeuksia ja epäluuloja vastaan ponnistellen, mutta aina eteenpäin.

Tuskin kukaan meidän päivinämme kieltää, että maailmamme kehitys ja kohtalo riippuu kansojen ja maiden välisestä suuremmasta ymmärtämyksestä. Niin reaaliset kuin taloudelliset tai poliittiset vastakohtaisuudet, eikä vähiten sellaiset vastakohtaisuudet, jotka syntyvät tapojen tai ajatusten erilaisuuksista, olisivat helpommin hallittavissa, jos paremmin voitaisiin ymmärtää toinen toisensa ajattelutapaa.

Oleellinen ehto, jotta tämä voisi tapahtua, on, että ymmärrämme toinen toistemme kieltä, ja että pystymme — kirjallisesti tai puheessa — todella luomaan yhteyksiä. Tämä tapahtuu nykyisin suurelta osalta käyttäen länsieurooppalaisia valtakieliä, nimenomaan englantia ja ranskaa, saksaa ja espanjaa tai italiaa. Niinkauan kuin olemme sellaisessa osassa maailmaa, missä yleisesti osataan esimerkiksi englantia, ei tämä ole epäkäytännöllistä, mutta olisi väärin uumistaa silmänsä siltä tosiseikalta, että päivä päivältä yhä useammat ryhmät ihmiskunnan kokonaisuudesta osallistuvat yleismaailmallisten kysymysten ratkaisemiseen, ja nyt on jo kysymys ryhmistä, joilla ei olekaan mikään mainituista valtakielistä jokapäiväisessä käytössä tai luonnollisena apukielenä.

Syntyy väkisinkin ajatus toimia yhteisen kansainvälisen kielen hyväksi, kielen, joka olisi koko maailman käytettävissä ja joka olisi hyödyksi kaikkialla maapallon pinnalla. Esperanto on sellainen kieli. Se on kohdannut tiellensä monia vastaväitteitä, usein sitä ei ole oikein ymmärretty, mutta tuskin kukaan epäilee, etteikö sillä

olisi kaikkia niitä ominaisuuksia, joita tuollaiselta yhteiseltä kieleltä vaaditaan. Se on helppo oppia. Se on rakenteeltaan yksinkertainen ja se rakentuu monien kulttuurikieltemme luomalle perustukselle.

Siksi minä tervehdin kaikkia niitä, jotka ovat omistautuneet kansainvälisen kielen tunnetuksi tekemiselle, ja toivotan heille menestystä sekä eteenpäinmenoa jatkuvastikin työssään.

### VOJO AL PLI PROFUNDA LINGVOSCIO

Estas tre bedaŭrinda la fakto, ke tre granda parto el ni esperantistoj restas por ĉiam komencantoj. Kvakam Esperanto estas tre facila lingvo, oni devas tamen iom labori por akiri sufiĉe bonan lingvoscion. Kio kauzas tion? Mi supozas, ke estas du kaŭzoj. La unua tre klara, tre universala kaŭzo: la maldiligenteco. Ĝi ne koncernas sole Esperanton, la problemo restas la sama, ankaŭ se ni parolas pri la studoj de kiu ajn lingvo. Oni ne havas la energion postulatan por legado de normala beletristika teksto en fremda lingvo. En la komenco ĝi ja estas tre laciga, oni sentas, ke estas neeble progresi. Tio tamen estas eraro. La tuta malfacilaĵo devenas de tio, ke ni havas nekonvenan teknikon en nia studado. Ne estas necese serĉi ĉiun nekonatan aŭ forgesitan vorton en la vortaro, kontraŭe, se oni eĉ kun ioma akurateco povas diveni la ideajn signifojn de tutaj frazoj ne konante ĉiujn vortojn aparte, des pli bone. Tiamaniere ni konstruas al ni bonegan lingvan instinkton, sur kiu poste baziĝas tio, ke ni nelaciĝante povas praktikadi la lingvon. La alia kaŭzo, krom la maldiligenteco, estas la iniciu malkorekta kredo, ke Esperanto estas tre facila lingvo. Tiel ja estas, Esperanto estas facila, sed ne tiel facila, ke oni povus ĝin ellerni ne samtempe studante kun ioma fervoro, kaj antaŭ ĉio, lernigante al si sufiĉan vortrezoron. Oni do devas

## Esperanto runouden kielenä

Vuonna 1958 ilmestyneessä 658-sivuisessa Antologiassa on 360 alkuperäistä esperantokielistä runoa vuosilta 1887—1957. Ne ovat 90:n runoilijan tuotteita ja edustavat 35 maata ja kaikkia maanosia. Nykyisin elävistä esperanto-runoilijoista ovat huomattavimpia unkarilaiset Kalman Kalocsay ja Julio Baghy, skotlantilaiset W. Auld ja R. Rosetti sekä englantilainen Marjorie Boulton. Myös runokäännöksissä esperanto on osoittanut kelpoisuutensa.

Arvovaltainen espanjalainen kirjallisuuslehti oli julistanut, että ranskalaisen runoilijan Baudelaire'n pääteosta, runokokoelmaa »Les fleurs du mal» on mahdoton kääntää muille kielille, mutta lehti tunnustaa erehtyneensä, kun sen esperantokielinen käännös ilmestyi v. 1957.

studi, por akiri lingvoscion, eĉ kiam estas parolo pri tiel facila lingvo kiel estas Esperanto.

Kion ni povas fari, por ke ni ne stagnu en nia lingva evoluo, sed fariĝu veraj vortokapablaj lingvorigantoj? Plej facila rimedo estas, ke ni unue tralegas iun bonan lernolibron, prefere tian, kiun oni povas tralegi sen aliaj helpiloj, ekzemple la bonega Privilegia Vojo de Setälä estas tia libro. Poste ni devus trovi ie ian daŭrigan libron, ekzemple Esperanta Legolibro, se ni ĝin ie povas trovi, ĝi nome estas jam elĉerpita. Mi aŭdis ie, ke Fondumo Esperanto en Helsinki esploras eblecojn publikigi — kiel daŭrigon al Privilegia Vojo — malnovan konaton, lernolibron »Ellernu» de Szilágyi, sed mi ne scias ĉu la kopirajto estos akirebla. Ĉiukaze, post unu aŭ du lernolibroj oni devus legadi librojn, laŭ tia tekniko, ke oni ne troe serĉadu en la vortaroj. Nialanda Esperanto-Servo povas havigi al ni bonajn librojn, ni nur legadu.

Arvikolo

# SE ONI NE KOMPRENAS LINGVON...

Mi venis en Finnlandon kiel tute juna, freŝedziniĝinta virino, apenaŭ fininta lernejon. Estis ĉarma aŭtuna tempo, kaj la vojaĝo en luksa, tute blanka ŝipo estis aventuro por mi. Mia edzo, kiu estis granda, larĝsultra kaj longkrura viro, kuŝis sur brakseĝo de ferdeko. Mi rigardis lin kun respekto — li estis tre klera, jam asesoro, juristo, kolonelo, dum mi estis nur preskaŭ infano. Mevoj flugis en svarmoj ĉirkaŭ la ŝipo, kaj la blu-kruca flago flagris en vento.

»Mi volas ion demandi al vi«, mi diris. »Mi scias, ke vi havas multe da amikoj kaj parencoj, kiuj verŝajne alvenos por renkonti nin. Kion mi devas diri al ili? Ion tre ĝentilan kaj respektaman?« — »Estas bone, ke vi volas esti ĝentila. Diru... jes, diru: Hyvää päivää, kalalokit (Bonan tagon, mevoj). Estas tre respektama frazo«.

Dum la tuta vojaĝo mi lernis tiujn strangajn vortojn. En Helsinki, vere, sur la kajo estis granda amaso da estimataj homoj por renkonti nin kaj vidi, kiaspecan birdon la asesoro importis el malproksimaj landoj. Mi rigardis ĉiujn fremdulojn kun grandaj, senkulpaj okuloj kaj diris: »Hyvää päivää, kalalokit«? — Tio estis la unua falpaŝo.

Kiel feliĉa mi estis pri mia propra hejmo! La ruĝvanga servistino Marta malfermis pordon kaj riverencis modeste. Mi ne povis paroli kun ŝi. Tamen ŝi fariĝis mia unua instruistino en la malfacila nova lingvo. Mi demandis ĉion. Se alvenis letero, mi demandis tuj: »Kio estas ĝi?« kaj ŝi respondis: »Kirje« (letero). Mi legis libron kaj demandis denove: »Marta, kio estas ĝi?« kaj ŝi respondis: »Kirja« (libro). Foje venis ŝia malgranda nevino. Mi demandis: »Kio estas ŝia nomo?« — Respondo: »Irja«. — O, mi pensis malespere. Ĉi tiun lingvon mi neniam lernos! Ĉiuj vortoj estas la

samaj.

Sed iom post iom mi lernis iun vorton kaj frazon. Okazis tamen falpaŝoj kaj eraroj. — Foje mi devis aĉeti gantojn, kaj mi diris al vendisto: »Antakaa minulle käsikenkiä«. (Donu al mi manŝuojn). Mi tradukis rekte el la gernana lingvo: Handschuhe.

Kiam mi elpakis mian valizon, mi trovis pli ol unu surprizon, kiun miaj gepatroj kaŝis inter miajn vestojn por ĝojigi min: mi ŝatis surprizojn super ĉio. Tiel mi trovis ankaŭ malgrandan libron, pratempan eldonajon, kiu enhavis paralelajn germanajn kaj finnajn frazojn. Ĉiun tagon mi lernis kelkajn frazojn parkere, kaj surprizigis mian edzon. Meze de lia rakonto mi povis ĵeti frazon, ekzemple: »Onko mokomaa kuultu?« — Estas tre malnova kaj ne plu uzata esprimo.

Hejme en mia lando ni havis ĉiam multe da gastoj. La ĉefa afero ne estis regalo. Ni interparolis pri interesaj temoj, mia patro kantis romancojn, unu el miaj junaj amikoj ludis violonon, iu deklamis poemojn, poste ni, gejunuloj, dancis kaj la maljunuloj rigardis kontente... Ĉi tie, en mia nova patrolando, mi konis nur amikojn de mia edzo, kiuj estis ankoraŭ pli maljunaj ol li. Oni ne dancis, kaj la konversacio fariĝis tre malriĉa, ĉar neniu kuraĝis refreŝigi sian lingvoscion akiritan en lernejo, kaj paroli germane kun mi. Estis terure sidi en la centro de homoj kaj ne havi kontakton kun ili, kaj ne kompreni eĉ unu vorton...

La gastamo de ĉi tiu lando sin limigis por mi plejparte en nomfestoj kaj entombigoj. La unua invito fariĝis tre stranga. La societo dividis sin tuj en tri grupojn. La gejunuloj foriris en la plej malproksiman ĉambron, kaj de tie estis aŭdataj gajaj eksplodoj de rido. La viroj malaperis en kabineton,

kaj oni nur vidis iliajn siluetojn inter dikaj nuboj de tabakfumo. La estimataj sinjorinoj sidis laŭmode rigidaj sur belaj antikvaj seĝoj de la salono kaj interparolis en la lingvoj de la lando, en kiuj oni ankaŭ povus vendi min. Tre dika sinjorino apud mi estis preskaŭ surda. Ŝi parolis iomete francan kaj germanan lingvojn, kaj mi kriis malespere respondojn en ŝiajn orelojn.

La dommastrino alvenis por informi, ke la kafo estas preta. Mi volis ekstari, sed neniu moviĝis, tial ankaŭ mi nur sidis kaj atendis. Denove la mastrino anoncis: »Bonvolu, la kafo estas preta!» Neniu moviĝis. Ĉu ili ĉiuj estis surdaj? Por la tria fojo la mastrino diris: »Bonvolu, bonvolu, gesinjoroj, la kafo estas preta!» Servistinoj en blankaj antaŭtukoj atendis

apud la superŝargita tablo, kaj el la plenaj tasoj leviĝis aromataodoro. — Feliĉe, mia edzo aperis apud mi, kaj mia surda konatulino demandis lin: »Asesoro, ĉu tiu estas via filino? Pro kio ŝi ne parolas al ni la svedan nek la finnan lingvon?» Kaj mia edzo respondis tuj: »Jes, ŝi estas mia filino el mia unua edziĝo. Ŝi lernis en internatlernejo en Svislando». — »Jaså, jaså», kapklinis la sinjorino kontente. — Mia edzo akompanis min en la manĝoĉambron. . . Kiel malsataj lupoj la gastoj ĉirkaŭis la tablon kaj ŝargis siajn telerojn en solena silento. Mia edzo donis brakon al mi kaj akompanis min al la manĝotablo. Apud li mi estis trankvila kaj certa ankaŭ en ĉi tiu stranga societo.

(Daŭrigota)  
Irene.

## UNU KUKOLO NE FARAS SOMERON

diras la konata proverbo, ne eĉ hirundo. Ankaŭ estas tiel, ke unu scienca studo farita per Esperanto ne povas konvinkigi ĉiujn sciencistojn de la mondo pri la uzovaloro de Esperanto. Tamen, estas bone ĉiam helpadi, se iu faras tian laboron, kaj tre bone konvenas nun, kiam printempaj fenomenoj aperadas en ĉiam pli rapida sinsekvo, ke ni ĉiuj laŭeble helpos al Sro De Smet, kiu faras enketon pri iuj specialaj fenologiaj observoj. Kovenas ankaŭ tre bone, ke la objekto de tiu ĉi studo estas sro Kukolo, kiu, kvankam ne estas kapabla sole fari someron, tamen povas per sia amuza voĉo ĝian alvenon anonci. Sro De Smet volus havigi al si precizajn informojn pri la apero de unuaj kukoloj en printempo. Jen estas bona kaj oportuna ebleco por ĉiuj esperantistaj ornitologoj aŭ birdamantoj

apliki nian lingvon al scienca uzo. Kiam vi aŭdas ĉisomere la konatan kaj amatan kukolkanton, skribu pri ĝi al Sro De Smet. Jen la demandoj pri kiuj temas:

- a) nomo de la loko kaj situo rilate iun gravan urbon
- b) dato de la alveno de la unua kukolo
- c) aspekto de la regiono
- d) (se eble) veterkondiĉoj dum la pasintaj tagoj
- e) via nomo kaj adreso.

La rezultoj de ĉi tiu enketo estos prilaborataj en scienca artikolo kiu aperos en esperanto. La nomoj de la informintoj estos citataj. Eble ĉi tiu enketo havos favoran influon en kelkaj sciencaj medioj.

Sendu la informojn al:

W. De Smet  
Graaf van Egmontstraat 16  
ANTWERPEN, Belgio

### ESPERANTO-OPISTON KESAKURSSIT

pidetään Väaksyssä heinäkuun 2 ja 8 päivien välisenä aikana. Annetaan sekä alkeisettä jatko-opetusta. Kurssien onnistumisesta vastaavat Vilho Setälä ja V. J. Kostainen.

Osanottomaksu täysihoitoinen mk 6000:—, kurssimaksu ilman majoitusta ja ruokaa mk 1000:—. Tarkempia tietoja Suomen Esperanto-Opiston toimistosta, os. Männikkötie 5 M 67, MAUNULA.

## NOKTOJ EN LA NORDO

Frua printempo. II

La lastaj tagoj de marto. Dikaj neĝotavoloj ankoraŭ kovras la kampojn kaj la teron sub la arbaroj. Sed la serenaj tagoj estas oftaj, kaj ĉiun fojon, kiam la suno disĵetas siajn varmajn radiojn, la neĝo ekdegelas. La tegmentoj jam estas malkovritaj, kaj ĉie en la arbaroj falintaj folietoj, branĉetoj kaj likenoj miksas la blankan koloron de la neĝo. La suno jam leviĝas je la sesa horo kaj malaperas preskaŭ je la deknaŭa. Dum la dektri horoj de diligenta laborado ĝi jam degeligas multon ĉiutage.

Vespere la surfaco de la neĝo estas malseka kaj mola. Eĉ sur la vojoj estas peze iradi, ĉar la botoj enpenetras preskaŭ gis la malmola tero. Sed ni eliru en la frua mateno, antaŭ la sunleviĝo! Ne estas bezone sekvi la vojojn. Ĉu ni iru kolekti salikajn branĉojn kun la ŝvelantaj burĝonoj, trans la kampoj? Ĉu vi preferas la skiojn? Per ili oni glitos laŭ la deklivoj kiel vento! Aŭ ĉu vin timigas tia rapideco? Do, ni piediru? La nokta malvarmo sub serena

ĉielo malmoligis la degelintan surfaceton de la neĝo. Dika krusto tegas la neĝamasojn kaj portas nin facile. Ankaŭ ni povas kunpreni la sledeton, la vintran velocipedon kun la ŝtalaj, flekseblaj glitiloj, kaj veturi konkure kun la skiantoj.

Jam frue la nokto estas hela. La aŭroro kvazaŭ kovras la plejparton de la firmamento kaj superbrilas la palajn stelojn. Fine leviĝas la suno mem, sed longe ankoraŭ daŭras, antaŭ oli ĝi estos sufiĉe alta por komenci sian laboron de degeligo. Tion nur ne atendu! Kiam la neĝkrusto komencos moliĝi, ĝi ne plu portos nian sledeton. Ni devos ĝin lasi ĉe la salikoj ĝis morgaŭ frue. Kaj komenciĝos peza kaj doloriga marŝado. La akraj kristaloj de la krustaĵo disŝiros niajn kruojn — kaj eble ni ne estos kapablaj reveni morgaŭ matene. Sed nokte kaj frumatene la krustaĵo portas nin: ni estas liberaj veturi laŭ nia gusto kaj prefero, ne demandante vojon antaŭan, nek postsignon de sledo aŭ skio. La feliĉa libereco sur la printempaj neĝvastaĵoj!

#### 14-a KONGRESO DE KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA EN 1961.

K.E.L.I. festos ĉi jare sian 50 jaran ekzistadon dum ĉi kongreso. Ĝi okazos en: Hockerill Training College, BISHOP'S STORTFORD, Herts., Britujo de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto (tuj antaŭ la U.K. en Harrogate).

Ni kore bonvenigas vin.

Ĉeftemo de la kongreso estos: »NIA TRUMPETO SONU«.

Krome okazos bibliaj studoj, distraj kunvenoj, filmprezentadoj kaj ekskursoj i.a. al Cambridge kaj Clacton-on-Sea. Ni faros tuttagan ekskurson al la brita ĉefurbo Londono.

Prezo de la partoprenado en la tuta kongreso inkluzive restado, manĝado, tranoktado kaj la tuttaga ekskurso estas £ 9.10.0.

Plurajn informojn donos al vi la kongresa sekretario:

S-ro F. Douglas Murphy  
7 Constable Road  
IPSWICH (Suffolk) BRITUJO.

#### VORTAROJ DE ESPERANTO

Mi havas la verkon Plena Vortaro de Esperanto (1934) sed ne la Suplementon de ĝi. Ĉu vi povus respondi en la gazeto, ĉu estas aŭ ĉu baldaŭ estos ricevela vortaro, ĉu tute esperanta, aŭ esperantofinna, kian oni bezonas por la vortoj oficialigitaj post 1934 kaj aliaj novaj vortoj.

Martti Suominen Kokemäki.

**Respondo:** Plena vortaro de Esperanto, kun suplemento de 1956, estas ricevebla je la prezo 980 mk. La novaj vortaroj E-F kaj F-E postulas ankoraŭ multe da laboro kaj da kapitalo.

La Plena Vortaro estas tre rekomendinda al ĉiu, kiu lernis la lingvon per Privilegia Vojo, ĉar per ĝi li kutimiĝis al esperantaj klarigoj de la sencoj. Ĝi estas mendebla ĉe.

#### ESPERANTO-SERVO

Pajupillintie 26 A 1, ETELÄ-KAARELA  
(Helsinki) postisiirto 6806, puh. 433251.



## PENTEKOSTA KONGRESO EN OSLO

Fondita en 1911 Norvega Esperantista Ligo festas dum ĉi tiu jaro sian 50-jaran jubileon. La jubileo estos celebrata per Jubilea Landa Kunveno (Kongreso), kiu okazos en Oslo dum la Pentekosto 20.—22. de Majo 1961.

La Estraro kaj Konsilantaro de Norvega Esperantista Ligo esperas vidi ankaŭ eksterlandajn gastojn dum nia Jubilea Landa Kunveno. Ni tial kore invitas ĉiujn Landajn Asociojn sendi reprezentantojn, kaj ni invitas ĉiujn esperantistojn anonci sin kiel gastojn. — La eksterlandaj gastoj kompreneble ne pagos kongreskotizon.

La programo de la Jubilea Landa Kunveno estos jena:

20. Majo je la 18.30: Interkonatiĝa Vespereo (en formo de Japana Vespereo).

21. Majo je la 9.00: Laborkunsido.

13.00: Lunĉo.

14.00: Laborkunsido.

19.00: Jubilea festeno: Komununa tagmanĝo, Jubilea Kavalkado, Ordena Promocio, Danco.

22. Majo je la 9.30: Laborkunsido.

13.00: Lunĉo.

14.00: Ekskurso tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵo.

Por eksterlandaj gastoj kiuj ne deziros ĉeesti la laborkunsidojn de N.E.L., oni eventuale faros apartajn aranĝojn.

Bonvolu anonci vin laŭeble frue al: Norvega Esperantista Ligo Boks 942, Oslo, Norvegujo.

Kun sinceraj salutoj,  
samideane

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

C. Støp-Bowitz

prezidanto.



### KOMPLETA LERNOLIBRO DE

### ESPERANTO EN BRAZILIO

### METODO ELEMENTAR DE ESPE-

RANTO — Speciale por Radio —

verkita de Prof. C. Torres Pastorino.

Dua eldono 1959. Brazila Esperanto-

Ligo. Prezo 15 Steloj aŭ egalvaloro.

La lernolibro konsistas el du volu-

moj. La pli malgranda, 58-paĝa volu-

mo enhavas nur ekzercajn tekstojn.

La alia volumo, 220-paĝa, estas komp-

leta, sisteme kunmetita lernolibro

enhavanta ekzercajn tekstojn, solvojn

de la tradukaj taskoj kaj nacilingvaj

klarigojn de gramatikaĵoj. La uzata

kvanto de vortoj, donata aparte pro

ĉiu leciono, estas tre granda: por

kelkaj lecionoj pli ol cent vortoj.

## KORESPONDADRESOJ:

František HVIŽD

Privozská 8

OSTRAVA 1

Ĉeĥoslovensko

HUNGARIO

15 gimnazioj kaj gimnazia direktoro (pri geografio). Adreso: ĉe sro Paŭlo Balkányi, Haraszt u 33, Pesthidegkút, BUDAPEST II.

Jadviga Dziwlik,

Boh. Stalingradu 65/3 m.

KRAKOW, Pollando

Olga Vladimirovna Zon,

Kraznodarskij kraj

Pionerskaja 60

SOĈI, U.S.S.R.

Pacdefenda Esperanto-Asocio

8 Linio, 8 Prospekto, Domo N:o 1/19

MAKEJEVKO Donbas, USSR.

Karel Rališ

Dolní ul ĉ 1,

PRAHA-NUSLE

Ĉeĥoslovakio

Gorg Pinter

Kilian Gy.l.t.

PAPA, Hungario

Wojciech Wozniak

Dziekanovice,

Myślenice, Pollando

Paulo Wilman

BYTOW

Zarząd Powiatowy ZMN

oj. Koszalin, Pollando

Ĝorgo Bosczewski

BYTOW

Komitet Powiatowy ZMS

woj. Koszalin, Pollando

Grześ Zukowski

BYTOW

Zarząd Powiatowy ZMW

woj. Koszalin, Pollando

Mario Suski

BYTOW

Powiatowy Dom Kultury,

woj. Koszalin, Pollando



En la fino de la libro troviĝas vasta folio montranta dividon de la gramatikaĵoj, prepozicioj, prefiksoj, sufiksoj k.a. al la 20 lecionoj. La libro estas zorge kunmetita kaj ĝia lingvo estas bonega.

H:s K.

## ĜOJIGA NOVAĴO

La granda librovendejo, SUOMALAINEN KIRJAKAUPPA en Helsinko, kiu estas unu el la plej ampleksaj librovendejoj de la tuta Eŭropo, kaj plej ampleksa en Finnlando, vendas librojn ankaŭ en la esperanta lingvo. Tiujn librojn ĉiu povas aĉeti ĉe la eksterlanda sekcio de la firmao, kaj, se okazus tiel, ke iu libro dezirata ne estus tuj havebla, oni ĝin nature povas ankaŭ mendi. Tamen, la stoko de esperantlingvaj libroj estas iom ampleksa, tiel ke oni facile trovas konvenan legaĵon por si. Por novaj esperantistoj ni povas rekomendi ekzemple libretojn »Karlo» de Privat kaj »La verda koro» de Baghy, kiujn ni vidis inter la aliaj esperantlingvaj verkoj en la vendejo. Kiel aliloke en ĉi tiu numero de nia gazeto estas dirite, per legado ni kreskas el la komencantula nivelo al veraj maturaj esperantistoj. Ni sentas dankemon al Suomalainen Kirjakauppa, havante ankaŭ esperantajn librojn en la stoko

INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ okazas ree en Helsingør venontsomere. Tiuj aranĝoj ja estas tre konataj en la tuta esperantista mondo, ĉar ili funkcias jam pli ol kvaronjarcenton! Kursaranĝoj estas tre diversgradaj, tiel ke ĉiu trovas sian propran, laŭ sia lingvostadio. Se iu samideano ne volas partopreni ian ajn kurson, li (aŭ nature ankaŭ ŝi) povas ankaŭ restadi kiel ordinara feria gasto, kiu tamen havas la avantaĝon de samideanaj kunuloj.

Sro L. Friis, kiu komencis la tutan jam tradician kursagadon en Helsingør, daŭre gvidas tiujn ĉi agrablajn aranĝojn, same kiel li faris daŭre ekde 1936! Li volonte sendos prospekton, senpage. Lia adreso estas:

L. Friis,  
Ingemannsvej 9,  
AABYHØJ, Danlando

Ĝi faras bonan servon al nialanda esperantistaro, nun ni ne bezonas atendi ĉiun unuopan libron tiel longe kiel ĝisnune!

## AL NOVA ESPERANTISTO

Vi tralegis la »Privilegian vojon» kaj vi volas utiligi vian lingvoscion kaj samtempe progresi en ĝi? Komencu per lego de facila literaturo! Jen rekomendindaj libretoj, unue la plej facilaj:

**Kamemoro: Mary kaj Sulo**, koresponda romaneto 13 paĝa, uzas nur la 500 plej oftajn radikojn de Esperanto. Per ĝi vi lernas mem korespondi kun eksterlandanoj. 25:—

**Vilho Setälä: Esperanto-kurso**, 48 paĝoj da facila teksto, ĉefe popolaj fabeloj pri bestoj. (ĉ. 700 radikoj, el kiuj preskaŭ ĉiu konata al la lerninto de Privilegia vojo). 50:—

**Edmond Privat: Karlo**, rakonto pri knabeto, de lia naskiĝo ĝis lia maturiĝo. 42 paĝoj. 60:—

**Vilho Setälä: Taglibro de kongresano**. 24 paĝoj. Intencita por uzo post »Mary kaj Sulo», al kiu ĝi aldonas 750 novajn radikojn, kursive presitajn en la teksto. Per ĉi tiu libro vi lernas ĉion por vojaĝo kaj ekkonas iom la agadon de Universala Esperanto-Asocio. 50:—

**Julio Baghy, La verda koro**. Facila romano el la vivo de esperantistoj en militkaptitejo, en Siberio. 100 paĝoj. 225:—

**Plenan libroliston** vi trovos en la plej freŝa Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio, kiu povas servi al vi ankaŭ per multaj aliaj manieroj. Aliĝu al la Asocio! Informojn donas

## ESPERANTO-SERVO

Pajupillintie 26 A 1  
ETELÄ-KAARELA (Helsinki)  
Postisiirto 6806, Puhelin 433251

## LIITTYKÄÄ »ADOPTAJ GEPATROJ»- SÄÄTIÖN JÄSENEKSI

Viime vuonna 70 esperantistia tai esperantojärjestöä maksoi osuuden rahastoon, jonka varoilla etäisistä maista lasten kongressiin tuleville esperantontaitoisille lapsille voitiin maksaa matka- ja kongressimaksuja. Silloin 10 6—13-vuotiasta lasta sai nauttia tästä edusta, näistä oli suomalaisia 4.

Nyt jälleen toivotaan Harrogaten 6. Lasten kongressiin lapsia eri maista, myös meiltä, mutta matkan kalleuden vuoksi se ei monelle ole mahdollista. Tämän kongressin järjestäjät vetoavat yksityisiin esperantisteihin esperantokerhoihin jne. tai myös esperantonkannattajiin, joille lasten onni ja kansainvälisen kielen tulevaisuus on kallis, rupeamaan »ottovanhimpain» (Adoptaj Gepatroj)-säätiön jäseniksi. Maksuosuus on määrätty 2700 markaksi (3 puntaa), joka voidaan suorittaa päädelegiiton postisiirtotilille Tu 60 253. Minulle on luvattu, että ainakin kaikki Suomesta kerätyt varat käytetään Suomen lasten osanotto- ja matkamenoihin ja että todennäköisesti tänäkin vuonna sen tuoma etuus annetaan jälleen 4 suomalaiselle lapselle. Mutta tämän edellytyksenä on, että myös me itse osallistumme tähän, liittymällä mainittuun säätiöön.

Kaikki »Adoptaj Gepatroj» saavat muistodiplomin joka julkisesti jaetaan lasten kongressin järjestämässä juhlassa. Lisäksi kukin saa nimensä Lasten kongressin albumiin.

Odotan meikäläiseltä kansainvälisen kielen ystäväjoukolta siis runsasta osallistumista säätiöön, jotta lastenkongressi nytkin saataisiin mahdollisimman kansainväliseksi ja esperantoharrastusta siten levitettyä myös nuorimman polven keskuuteen.

Autettavien lasten, ja järjestäjien puolesta kiitän jokaista antajaa.

Joel Vilkki, SOMERO

## KOREKTO

En la artikolo pri tradukantaj maŝinoj aperis bedaŭrinda preseraro (sur la 19a paĝo), la tempo, kiun la rapida memoro postulas por trovi informeron, ne estas kalkulata en milionoj da sekundoj, nature, sed en miliononoj (miliononoj) da sekundo. Post la apero de la menciita artikolo ni aŭdis pri nova ilaro, en kiu la respektiva tempo kalkuligas en nanosekundoj, kiuj estas milardonoj da sekundo, la rapideco estas milobla al la jam terura mikrosekunda tempokalkulo.

## ESPERANTON OPPIKIRJOJEN HINNAT

(maaliskuusta 1961, ilman lvv.)

**Valtatie kielitaitoon**, luonnonmenetelmän mukainen, kuvitettu oppikirja, 128 sivua. Ostajan valinnan mukaan joko oppikirja- tai taskukirjakoossa. 380:—

### LISÄETU

Valtatie ostajille:  
Esperanta Finnlandon vuosikerran saa satasen alennuksella, siis hintaan 250:—

### POSTIMAKSUT

Hintoihin on lisättävä, jos tilataan  
Valtatie yksin 15:—  
Apukirjat 10:—  
Valtatie ynnä apukirjat 20:—

### APUKIRJAT

Suosittelavat varsinkin kielenopiskeluun tottumattomille.

**Esperanto-avain** (kieliopin runko ynnä pieni esperanto-suomalainen sanasto), 4+32 pientä sivua 50 mk

**Esperanton vasta-avain** (pieni suomi-esperanto sanasto), 32 sivua 50 mk

**Lyhyt esperanton kielioppi** (koko muoto-oppi sekä lauseopillisia sääntöjä). koko edellisiä 2 × suurempi, 16 sivua 65 mk

**APUKIRJAT yhteensä 165 mk**

### ESPERANTO-SERVO

Pajupillintie 26 A 1  
ETELÄ-KAARELA (Helsinki)  
Postisiirto 6806, Puhelin 433251